THE

Australian Esperantist.

A Monthly Journal Devoted to the Interests of Esperanto.

Registered at the General Post-Office, Melbourne, for transmission as a Newspaper.

VOL. 1. N-RO. 3. JULIO, 1908. PREZO 3 PENCOJ.

AL NIAJ LEGANTOJ.

Ni ĝojas anonci ke la junian numeron de nia jurnalo oni akceptis multe pli varme ol la majan. Tre kuraĝigajn leterojn ni jam ricevis, kaj ankoraŭ per ĉiu poŝto alvenas aliaj. Multe da skribintoj demandis pri la plej bonaj verkoj por komencantoj. Tiuj turnu sin al artikoleto en la maja numero, "Advice to Beginners." Al tio ni aldonu la jenan konsilon: —Ĉiu fervora esperantisto devus posedi, pli aŭ malpli frue, la "Fundamenta Krestomatio"-n de la genia elpensinto de la lingvo, Dro. Zamenhof. Ĝi estas plena gvidisto por la lernanto, kaj ankaŭ prezentas stilmodelon kiun ĉiu esperantisto devus imiti. Kiu zorge trastudis ĝin unu-dufoje, tiu tiel evitos multe da eraroj kiujn kutime faras komencantoj. En la Krestomatio, la majstro nin kondukas, kiel infanojn, tra la ekzercoj, fabeloj kaj legendoj, anekdotoj, ĝis la rakontoj, ĉiuj el kiuj estas bonegaj. Tiam sekvas kelkaj interesaj paĝoj pri la vivo kaj la sciencoj, kaj ankaŭ kelkaj admirindaj artikoloj pri Esperanto mem; fine, 143 paĝoj da poezio. Ni kore rekomendas ĉiujn esperantistojn "legi, marki, ellerni, kaj interne digesti" ĉi tiun kvazaŭan "esperantan biblion." Ili tiel posedos bonegan armilon kontraŭ ĉiaspecaj ŝanĝoj (tiel nomitaj plibonigoj) kiujn kelkaj nuntempaj fantaziuloj en Eŭropo penadas altrudi al la esperantistaro tutmonda.

"Vi friponeto, kial vi envenis en mian domon?" diris malgrasa avarulo al vaganta muso. "Vi ne havas kaŭzon por timi; mi nur loĝados ĉe vi, mi manĝados aliloke," rediris la muso.

E. F. L. el Lucilius.

TO OUR READERS.

We are glad to announce that the June number of our journal was much more warmly received than that of May. We have already received many very encouraging letters, and others are still arriving by every mail. Many of the writers have enquired as to the best works for beginners. Let them turn to a small article in the May number, "Advice to Beginners." Let us add to this the following advice: —Every fervent Esperantist should sooner or later possess the "Fundamental Chrestomathy," by the ingenious inventor of the language, Dr. Zamenhof. It is a complete guide for the student, and also presents a model of style which every Esperantist should imitate. He who has carefully studied it through once or twice, will thus avoid many of the mistakes which beginners usually make. In the Chrestomathy the Master conducts us, like children, through the exercises, fables and legends, and anecdotes up to the stories, all of which are excellent. Then follow some interesting pages concerning life and the sciences, and also some admirable articles about Esperanto itself; finally, 143 pages of poetry. We heartily recommend all Esperantists to "read, mark, learn and inwardly digest" this, as it were "Esperanto Bible." They will thus possess an excellent weapon against all kinds of changes (so-called improvements), which, at the present time, some eccentric persons in Europe are endeavoring to foist on the universal body of Esperantists.

Readers in other States are requested not to send stamps in future, as they are valueless in Victoria. Postal notes for 6d are now obtainable.

KORESPONADO.

Frino. L. A. Ward, Hon. Sec. Warburton Esperanto Club, writes: —"Nia grupo ne estas ankoraŭ fondita tri monatojn. Ni havas nun kvardekdu membrojn, kaj multaj ekstere ankaŭ interesiĝas. Klubkunvenoj okazas duonmonate, kaj kursoj fariĝas intertempe. Sro. Booth, Prez. Melburna Klubo, vizitis nin kaj faris plej interesan priesperantan paroladon. Ni kore bonvenos aliajn samideanojn ĉe Warburton."

From E. T. Cobb, Fitzroy :— "Tiuj Esperantaj lernantoj kiuj legadas "The British Esperantist" povas trovi en la maja numero, la unuan el serio da tre interesaj artikoloj pri "La praktikaj ecoj de Esperanto," de Abato Austin Richardson. La unua artikolo traktas "La supersignitajn literojn," nome, ĉ, ĝ, ĵ, ĥ, kaj ŝ.

Oni devas ĝoji ĉar "The Australian Esperantist" presadas tiujn literojn. Jen estas frazo eltirata el la "Internacia Revuo," kiu ne uzadas la supersignitajn literojn :— 'Por donaco de chiuj verkoj, libroj, broshuroj, revuoj, artikoloj (eltranchitaj el jhurnaloj), kiuj rilatas aŭ ghenerale aŭ speciale al la helplingva demando, aŭ al pasigrafio.'"

Ciuj legantoj devas allasi ke ĉi tiu presmaniero ŝajnas tre malgracia kompare kun la nia.—Red.

A USEFUL ALLY.

The Brisbane "Saturday Observer" still continues to advance the interests of our journal. In the Esperanto column, which is a feature in this popular weekly, "Esperance" writes as follows :—

The local Australian Esperanto gazeto is one which all Australian Esperantists should support. Without your encouragement and financial support in the way of subscription it is impossible to print and publish our little "gazeto." At least 150 subscribers are required to pay the publishing expenses. Surely in Australia there are 150 devoted Esperantists who will send in their subscriptions —three shillings yearly, plus postage—to the editor, Bridge-street, Benalla, Victoria. If you are in earnest about the idea of an international "help-language," you will at once become subscribers to this journal, which will be a rallying point—a centre to which all can turn. Of course, it is necessarily not yet an elaborate affair, but with your generous aid and support it will soon become to Australia what the British Esperantist, the German Esperantist, etc., is to Britain, Germany, etc., a generous guide to the beginners, a friend to all, and a source of inspiration and encouragement to those who are bearing the burden and the buffets of the battle in the propagation of the idea of the auxiliary language, and mayhap a little weary of the arduous labour, to say nothing of the banter, gibes, and "mokado," to which the propagandist is subject. If you want to hear a man discuss something about which he knows nothing, listen to an opposer of Esperanto airing his views thereon. One is almost inclined to give up discussions, but don't; just take him aside and tell him in the politest way you can that he's "one budgery fella' ass." Poor fellow! he can't help being an ass, though; he's as God made him, and—worse. Even a mosquito has its use in the economy of nature; an unpleasant detail, notwithstanding! But what I was about to say before the scoffer led me from my track, was to ask the Queensland Esperantists to rally round the new "gazeto," and please don't expect too much, and don't be too captious or critical about it. "We are none of us infallible; no, not even the youngest." Here's success to the venture!

KONVERTIĜO PER SONĜO.

Karolo Braŭn estis rutinulo. Li devenis de longa vico da rutinuloj. Lia avo kontraŭstaris la enkondukadon de fervojoj, kaj sendube lia praavo voĉdonus kontraŭ Galileo, se ĉi tiu saĝulo ne ĉesus insisti pri la ĉirkaŭiradlo de la terglobo. Estis domaĝo ke la junulo heredis tiajn ideojn, ĉar li estis bela kaj agrabla. Li dancadis ĉarmege, kaj estis tiela majstro de la nobla amindumarto, ke ĉe baloj aŭ vesperkunvenoj, ĉiuj fraŭlinoj vete penadis

allogi lian atenton, kaj pro tio, nia junulo fariĝis iom maltima kaj trudema. Unu tagon, eniris, la vilaĝon esperantisto, kiu faris bonegan paroladon pri la helpa lingvo, kaj, klarigis la tre simplan gramatikon, k.t.p., tiel ke la tuta aŭdantaro tute ĝin komprenis. Karolo ĉeestis la paroladon, sed li estis tiel impresita de la praavaj antaŭjuĝoj, ke la parolado tute ne interesis lin. Dum la sekvinta semajno li ridadis kaj mokadis la esperantisman ideon, kaj se vi volas scii pri liaj kontraŭdiroj, turnu vi al la "Krestomatio." Malgraŭ tio la kara lingvo disvastiĝadis en la vilaĝo, sed li ankoraŭ daŭrigadis la mokadon. Unu nokton, post kolera argumentado kun kelkaj novaj esperantistoj; en kiu, laŭ sia opinio, li estas venkinto; li iris kuŝiĝi, kaj tuj ekdormis. Sonĝo vizitis lin. Li estis en balsalono, frake vestita laŭkutime; kaj ĉie ĉirkaŭe flirtis nimfsimilaj figuroj ravige ornamitaj. Kiam li povis sufiĉe sin trankviligi, li alproksimiĝis al fraŭlino kiun li rekonis, kaj petis, angle, la honoron danci kun ŝi. Ŝi skuis la kapeton, kaj diris, "Mi ne komprenas vin, sinjoro." "Kion signifas tio?" Karolo pensis en si mem. Kaj aŭskultante iomete, li eksciis ke la tuta ĉeestantaro paroladis en nova lingvo, kaj iel; li ne sciis kiel, li konstatis ke tio estas Esperanto. Jen li trovis sin, fremdulo, inter gajaj geesperantistoj, kiuj dancadis, ĉirkaŭflirtis, kaj amindumadis senhonte, antaŭ liaj okuloj mem. Nenia kompata ekrigardo atingis lin. Li malŝparadis sian dolĉecon en dezerta aero. Unu post alia konatulino preterpasis lin neatente, kaj fine li ne povis plu reteni sin, kaj ĉirkaŭprenante la ĉefbelulinon el ĉiuj, li pasie kisis ŝin kaj—ekvekiĝis. Ia nebula, neklara sento ankoraŭ restis ĉe li, kvazaŭ varmaj lipoj redonas liajn kisojn; sed, ellitiĝinte li malsupreniris, por matenmanĝi. Kiel fraŭlo, li tralegis la ĵurnalon manĝante, kaj prezentu al vi lian miregon kiam li ekvidis la jenan reklamon :—

"ESPERANTA BALO

"Okazos, la 30an de julio proksima, en la salonego de la Reĝa Institucio je 8.30 p.m. Enirpago, 5/-. Ĉiuj ĉeestontoj, senescepte devos paroli esperante."

"Kion fari?" li pensis, finante la manĝon; sed li baldaŭ decidiĝis. Rapidirante butikon de librovendisto, kiu okaze estis esperantisto, li aĉetis la lernlibron de O'Connor, kaj dum la sekvintaj vesperoj ĝis la baldato, studis diligente. Estante nature lerta, li baldaŭ ellernis la lingvon, kaj aperis ĉe la balo, portante la verdan stelon. Li frue ekvidis la sonĝbelulinon, sed kia diferenco! Ili nun dancadis kune, kaj amindumadis, kaj antaŭ ol la sonorilo batis la nokmezon, li sukcesis—sed en ĉi tiu okazo, ne sonĝe. Li ĉiam dankas la sonĝon por bonega, belega edzino.

Arthur E. Barrington,

LA KURAĜO.

Perfekta kuraĝo kaj absoluta malkuraĝeco estas du ekstremajoj kiujn oni malofte atingas. La interspaco estas larĝega, kaj enhavas ĉiujn aliajn specojn de l'kuraĝo, kiuj estas tiel diversaj kiel la homaj vizaĝoj kaj humoroj. Estas viroj kiuj riskas sin volonte en la komenco de batalo, sed kiuj malvigliĝas kaj malkuraĝas facile se ĝi daŭras. Estas kelkaj kiuj kontentiĝas, plenuminte la socialan honoran leĝaron, kaj faras malmulte plu. Ni rimarkas iujn kiuj en ĉiuj okazoj ne egale estras sian timecon; aliaj lasas sin konfuziĝi pro ĝenerala paniko; aliaj antaŭenkuras al l'atako, tial ke ili timas resti ĉe siaj postenoj. Oni trovas iujn kies kutimeco al malgravaj danĝeroj plifortigas la kuraĝon, kaj pretigas ilin kontraŭstari pli gravajn. Unuj kontraŭstaras glavtranĉojn kuraĝe, kaj timegas la pafiladon; aliaj estas neŝanceleblaj sub la pafilado, kaj timas glavbatali. Ĉiuj ĉi diversaj specoj de l'kuraĝo similiĝas pro tio: la nokto, pliigante la timecon, kaj kaŝante agojn kaj bonajn kaj malbonajn, ebligas ĉiun homon sin savi. Estas ankaŭ alia pli ĝenerala diskreteco; ĉar estas neniu kiu faras ĉion kion li povus fari en batalo, se li certiĝus eliĝi sendanĝere, tial estas klare ke la timo de l'morto de prenas iom de la kuraĝo.

Duc de la Rochefoucauld.

Trad. Esp. 16479.

ELTIRAĴO EL "RAKONTOJ AL MIA BELULINO."

De Jean Bach Sisley.

Mi citos al vi, mia belulino, nek ĉiujn landojn, kiujn trairis la princo por aliri al la feino de la maroj, nek ĉiujn danĝerojn, kiuj minacis lin; devas esti sufiĉe por vi scii, ke nombraj estis la landoj kaj timindaj la danĝeroj. Li trairis profundajn arbarojn kun funebra ombro, kaj sentis ilian teruregon; li vidis ekfoliantajn arbarojn kun denskreska musko sur kiu ripozis enamiĝintoj; li, sub la rideto de la festa suno, transiris herbejojn emajlitajn je floroj; li trinkis el kaŝataj fontoj kaj interparoladis kun najtingaloj. Unu nokton, anstataŭ litbaldakeno, li havis la veluran drapiraĵon de la ĉielo dissemita je steloj, alian tagon, li alvenis grandan urbon, en kiu ĉiuj homoj ĝojiĝis pro la edziĝo de la reĝo; sur la konstruaĵoj, standardoj malvolviĝis laŭ la vento; en la stratoj, treme briletis la iluminadoj, kaj la "Vivu!" de la popolamaso estis por la junaj geedzoj glora koncerto edziĝa. Li estis akceptata en la palaco de tiel bela kaj tiel bona princino, ke ŝajnis al li, ke li vidas la feinon mem de la maroj, kaj, vespere, ekdormante meze de la ĝojkrioj de la popolamaso, li demandis sin, ĉu li daŭrigos la iradon. La morgaŭan tagon, subite eksplodis revolucio. Li estis devigata batali flanke de la reĝo; li estis vundata kaj kaptata, kaj tra la fenestroj de sia malliberejo, li dum longaj tagoj aŭdis la elvokadojn de la malkvietigata popolaĉo kaj la kriegon: "Mortu la tirano!"

Tradukis L. Touchebeuf.

LA SAGO KAJ LA KANTO.

(El Longfellow.)

Mi pafis sagon en la aeron,
Ne scias, kie ĝi falis teron;
La forfluganta tiel rapidis,
Ke mi la kuron tute ne vidis.

Mi spiris kanton en la aeron,
Ne scias, kie ĝi falis teron!
Eĉ la plej bona akrevidanto
Ne povas sekvi flugon de l'kanto.

Mi longe poste, unu tagon,
En kverko trovis la tutan sagon;
La tutan kanton kun la muziko
Mi trovis en la kor' de amiko.

A. GRABOWSKI.

KELKAJ PROVERBOJ KAJ MORALAJ PRIPENSOJ.

(De la Rochefoucauld.)

Hipokriteco estas la depago de la malvirto al la virto.

Nek la sunon nek la morton oni povas fikse rigardi.

La homoj ofte fieriĝas pri siaj pasioj, eĉ la plej krimaj; sed la envio estas timega kaj hontinda pasio kiun neniuj iam kuraĝas konfesi.

Se ni havus neniujn kulpojn, ne plaĉus al ni rimarki tiujn de aliaj.

La amo kiel la fajro ne povas ekzisti sen daŭra movado, kaj ĉesas vivi tuj kiam ĝi ĉesas esperi aŭ timi.

La espero, kvankam trompema, almenaŭ servas por nin konduki al la vivfino laŭ plaĉa vojo.

Malvirtoj partoprenas en la kompono de virtoj kiel venenoj en la kompono de kuraciloj. La prudento kolektas kaj aliigas ilin, kaj uzas ilin utile kontraŭ la malbonajoj de la vivo.

Perfekta kuraĝo estas fari nevidata kion ni povus fari antaŭ la tuta mondo.

A.E.B.

KELKAJ SPRITAĴOJ.

Kiu povas fanfaroni nur pri siaj famaj prapatroj, similas al la terpomo kies sola virto kuŝas sub la tero.

La plej ŝatinda eco de la morto estas tio, ke oni ne bezonos ellitiĝi matene.

Tallyrand, demandite de sinjorino kion li opinias pri ŝia robo, respondis, ke ĝi komenciĝis tro malfrue, kaj finiĝis tro frue.

Piedfrapo estas tiel efika kiel pulpebrumo por obstina blinda ĉevalo.

L.T.

Printed and published by R. Dossor, for the Benalla Esperanto Club, Bridge Street, Benalla, in the State of Victoria.